SPECIALA NUMERO

# HELIKO

GAZETO DE ESPERANTO-SOCIETO RIJEKA


NUMERO 1 (17) - JARO 2003

## ESPERANTO-SOCIETO RIJEKA EN LA NOVA EJO

## LIBERA EŬROPIA UNIVERSITATO EN KOMARNO, SLOVAKIO FONDATA

## POKALO KOSTRENA 2003

## MEZEŬROPO ESTAS MIA HEJMO



Nova kunvenejo de Esperanto-Societo Rijeka
Fotis: Boris Di Costanzo

# SALUTO DE LA REDAKTORO

*Karaj legantoj*

*Multaj jaroj pasis de la lasta numero de "Heliko". De la malproksima jaro 1988 ĝis nun multaj aferoj okazis kaj ŝanĝiĝis. Sed mi esperantistiĝis 11 jarojn post ĝia lasta apero. Pro tio mi preferas paroli pri "pli junaj" datoj. Hodiaŭ mi havas ŝancon skribi mian unuan enkondukon. Sed ŝanco ne estas nur ricevi monon de urbo. Ankaŭ ne nur bona volo. Pri kio ja povus skribi kluba gazeto? Esperanto-Societo Rijeka estas aktiva. Ĉi-numere ni publikigas tekstojn de 9 niaj membroj. Tiuj ne estas ĉiuj kiuj partoprenas kunsidojn de la societo, ekskursas kun ni, gvidas kursojn aŭ alimaniere kontribuas al niaj sukcesoj. Eĉ tiuj kiuj nur de tempo al tempo iomete aktivas, tion faras kiam necesas.*

*Dank' al tio nia societo aktivas eĉ pli ol estas priskribite en ĉi numero. La societo ordinare okazigas kursojn. La nunan kurson de Josipa Katunar frekventas 12 kursanoj.*

*Ankoraŭ ekzistas kurso, ne tiel granda, en elementa lernejo Dr. Andrija Mohorovičić, Matulji. Lunde, dum kunvenoj ni okazigas mallongajn prelegojn de niaj membroj. Kvin Rijekaanoj partoprenis UK-on en Gotenburgo. Kaj ankoraŭ multe pli.*

*Dankon al ĉiuj kunlaborantoj kaj sukceson al ĉiuj legantoj*


*Emil Hrvatin*


## HELIKO

Numero 1/2003 (17)
Eldonas: Esperanto Društvo Rijeka, Blaža Polića 2, 51000 Rijeka, Tel./fakso: 051 228148, rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr
Tiu ĉi numero estas eldonita per helpo de Departamento por kulturo de urbo Rijeka..
Respondecas: Boris Di Costanzo
Kontribuis: Boris Di Costanzo, Emil Hrvatin, Gordana Katunar, Josipa Katunar, Pero Krstulović, Vjekoslav Morankić, Ana Radulović, Ana Then, Marcello Trampuh
Radaktoro: Emil Hrvatin,
Tel: 051 275 468, rete: emil.hrvatin@ri.htnet.hr
Lektoro: Spomenka Štimec
Grafike aranĝis: Josip Pleadin
Presis: Grafokom, Đurđevac

## HELIKO

Broj 1/ 2003 (17)
Izdavač: Esperanto društvo Rijeka, Blaža Polića 2, 51000 Rijeka, Tel./fax: 051 228 148,
Naslov na mreži: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr
Časopis je sufinanciran sredstvima Odjela gradske uprave za kulturu grada Rijeke
Za izdavača: Boris Di Costanzo
Suradnici: Boris Di Costanzo, Emil Hrvatin, Gordana Katunar, Josipa Katunar, Pero Krstulović, Vjekoslav Morankić, Ana Radulović, Ana Then, Marcello Trampuh
Urednik: Emil Hrvatin, Tel: 051 275 468,
Naslov na mreži: emil.hrvatin@ri.htnet.hr
Lektor: Spomenka Štimec
Grafički urednik: Josip Pleadin
Tisak: Grafokom, Đurđevac



# SALUTO DE LA PREZIDANTO

*Estimataj geanoj!*

*Jen post multaj jaroj de abstino ni denove havas eblecon tajpi nian iaman, konatan gazeton "Heliko". Mi esperas ke ĝi estos almenaŭ proksimume interesa al vi kiel tiuj estintaj numeroj.*

*Pasis jam 15 jaroj de la laste aperita numero. En tiuj pasintaj jaroj okazis multaj eventoj kiel en nia societo samtiel ankaŭ en E-movado.*

*La plej grava evento por nia Societo nun estas translokiĝo en novan ejon, kie ni finfine ricevis lokon por iomete normale labori. Mi uzas ŝancon ke mi persone dankegu al ĉiuj kiuj helpis dum translokiĝo. Same mi dankas al anaro kiu helpis en pasintaj aranĝoj.*

*Je la fino de tiu salutparolado mi dezirus sendi al vi malgrandan mesaĝon:*

*Estimataj gelegantoj de "Heliko", malgraŭ malfacilaĵoj kiujn trapasis nia patrolando kaj nia E-societo Rijeka jen tiu ĉi aperita numero de gazeto "Heliko" montras ke ni tamen vivantaj estas kaj mi esperanta estas, ke ni estos ankaŭ vivontaj.*

*Dankon pro tralego kaj ĝis revido en nia societejo!*

*Boris Di Costanzo*

---

# KIOM DA MEMBROJ HAVAS NIA SOCIETO?

Nia Esperanto--Societo Rijeka estas fondita en 1946a jaro. Unuan konstituantan kunsidon ĉeestis 35 esperantistoj. De la komenco ĝis hodiaŭ nombro de membroj de la societo variadis inter 35 kaj proksimume 120. Nun ni ne havas ĝustajn donitaĵojn por la pasinta tempo. Eble iun tagon iu estus povonta en nia arkivo almenaŭ parte esplori pasintecon. Sed ekde la jaro 1988 la societo havas registrolibron. En ĝi estas la 31-an de decembro 1988 enskribitaj 35 membroj. De tiam ĝis hodiaŭ en la societon mebriĝis 82 esperantistoj. Do la donitaĵoj montras jenon:


| | |
|---|---|
| Nombro de mebroj la 31-an de decembro 1988 | 35 |
| de post tiu dato ĝis 30-a de septembro 2003 membriĝis | 82 |
| forpasis | 23 |
| eksmebriĝis | 6 |
| la societo formembrigis | 33 |
| Nuna nombro de membroj en la societo | 55 |

Formembrigitaj anoj estas eksmembroj kiujn la societo eksmembrigis pro nepago de membrokotizo dum pli ol du aŭ tri jaroj.

Vjekoslav Morankić



**Kurso en nia societejo gvidata de Josipa Katunar**





# TRANSLOKIĜO

Post pli ol 30 jaroj nia Societo eluzis ŝancon translokiĝi en pli vastan ejon. Tio okazis septembron ĉi-jare kiam la urbaj instancoj transdonis ŝlosilojn al ni. Translokiĝo okazis el adreso Korzo 2a al adreso Blaža Polića 2 samurbe. Nova societejo situas apud publika merkato "Brajda" kaj proksime de fervoja stacidomo (200 m oriente).

La societejo troviĝas en la unua etaĝo, kaj ĝia surfaco estas 56 m2. Ĝi konsistas el tri apartigitaj ĉambroj en vico. En ĉiun eblas eniri el koridoro kaj el la centra ĉambro en la flankajn. Fine de la koridoro troviĝas necesejo.

En la societejo oni facile nun oraganizas samtempe kurson, prelegon kaj en la tria ĉambro oni trankvile povas en biblioteko tralegi ion interesan. Vere inda situacio. Solvenda estas ankoraŭ nur komuna enirejo, sed ni tion solvas kun respondeculoj de urbo Rijeka.

Ĝis nun en la nova societejo ni organizis kelkajn societajn kunvenojn kaj anaro estas vere kontenta kaj ĝoja pro tiu okazo.

Je nomo de Esperanto-Societo Rijeka mi ege kaj kore dankas al ĉiuj kiuj helpis je tiu agado, kaj ankaŭ al anoj kiuj volis helpi, sed ne povis, same ankaŭ al tiuj kiuj volis, sed forgesis.

Aparte ni tre dankas al enterprenoj:

"Chromos" el Zagrebo, filio Rijeka
"Moby Dick" el Matulji
"Zanatservis" el Opatija

kiuj kontribuis en ordigo kaj translokiĝo.

Bonvolu veni kaj trarigardi la novan Societejon!

Bonvenon al ĉiuj!

*Boris Di Costanzo*



***Translokiĝo: lasta peco de meblo.***

# NOTICO PRI NIA BIBLIOTEKO

Estas malfacile pri io, kio bezonas ankoraŭ multe da laboro kaj studado - jes studado - ĉar mi ne estas bibliotekistino laŭ mia profesio - do mi ne konas multajn detalojn en tiu ĉi fako. Tamen ion mi povas diri:

Nia biblioteko estas sufiĉe riĉa: ĝi posedas pli ol mil librojn (originalaj kaj tradukitaj) de konataj kaj ĝis nun nekonataj aŭtoroj de diversaj landoj.

La libroj estas dividitaj en sep grupojn - ĉiu grupo havas kelkajn subgupojn. La plej riĉa estas tiu pri romanoj, rakontoj kaj noveloj.

Trafoliumi la librojn de la kongresoj al kiuj niaj klunbanoj ĉeestis (de Reykjavik ĝis Pekino) estas ankaŭ tre interesa.

Vojaĝemuloj trovus en la sesa grupo multajn interesajn gvidlibrojn tra nekonataj landoj.

Kvankam - kiel proverbo diras - libro estas la plej bona amiko - niaj klubanoj (krom malmultaj esceptoj) ne legas multe. Bedaŭrinde.

Mi esperas ke nun, kiam ni translokiĝis en pli belajn kaj vastajn ejojn (tri, ne nur unu), kaj ĉar ili sin trovas en la unua etaĝo (do ne estas multaj ŝtupoj), niaj anoj venos pli ofte serĉi amikojn tra bonaj libroj.

Por biblioteko

Josipa Katunar

# MEZEŬROPA KONSULTIĜO DE LANDAJ ESPERANTAJ ASOCIOJ

En urbo Gliwice (Polando) okazis ekde la 12-a ĝis la 14-a de septembro 2003 Mezeŭropa Konsultiĝo de Landaj Esperantaj Asocioj. La Konsultiĝon partoprenis 5 Landaj E-Asocioj el: Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Kroatio, kies delegitaroj konsistis el po du delegitoj po lando. Delegacio el Kroatio konsistis ĉi-jare el du membroj de Esperanto-Societo Rijeka, Vjekoslav Morankić kaj Boris Di Costanzo. Dum vere tre ampleksa tagordo kaj tuttaga laboro, la partoprenantoj fine akceptis Deklaracion kies tekston ni prezentas en daŭrigo. La Konsultigho daŭris du tagojn kaj pritraktis E-problemojn pri enkonduko de E-lingvo en elementajn lernejojn kaj pri enkonduko de la lingvo kiel egalrajta al aliaj lingvoj de Eŭropa Unio. Krom la ĉefaj punktoj de la tagordo estis ankoraŭ multaj diskutoj pri landaj E-problemoj, precipe kiumaniere enprogramigi Esperanto-lingvon en ŝtatajn programojn.

Nia delegacio prezentis, post tiuj supre menciitaj diskutoj, eblecon por gastumado kaj varbado de gastoj en nia "Esperanto Domo" en Kostrena.

La Konsultiĝon salutis ankaŭ urbestro de Gliwice. Same ĝi estis prezentita pere de elsendo de radio-stacioj kaj gazetaro. Kiel kutime okazas, la domastroj invitis nin al tagmanĝo post tre bela vizito al arĝent- kaj plumbo-minejo en prokisimeco de la urbo. La kroata delegacio revenante hejme vizitis urbon Komarno okaze de la kunveno kun dr. prof. Eva Polakova, kies temo estis interparolado pri starigota Universitato en urbo Komarno.

Boris Di Costanzo



*Vizitante la minejojn en la proksimeco de Gliwice.*

## REZOLUCIO

La reprezentantoj de Mez-Eŭropaj Esperanto-Asocioj, kunvenintaj en Gliwice, Pollando, inter la 12a kaj 14a de septembro 2003,

- **traktante** la temon "Lingva komunikado en la plivastiĝanta Eŭropa Unio",
- **konstatis,** ke la problemoj de lingva komunikado eĉ pliakriĝos post la disvastigo de EU, pro tio
- **alvokas** la respondecajn instituciojn de membro-ŝtatoj nunaj kaj estontaj, solvi la lingvan komunikadon ene de Eŭropa Unio laŭ sia baza principo, nome egalrajteco de ĉiuj civitanoj kaj ties lingvoj,
- **proponas** tiucele Esperanton, la neŭtralan internacian lingvon,
- **postulas** la elekteblecon de Esperanta lingvo en ĉiuj niveloj de ŝtata lingvoinstruado.

Gliwice, la 14-an de septembro 2003.

# LIBERA EŬROPIA UNIVERSITATO EN KOMARNO, SLOVAKIO FONDATA

Se temas pri la fondota Libera Eŭropia Universitato "Academia Kelemantia" en Komarno, ni devas konstati ke Kroata Esperanto-Ligo (KEL) havas seriozan intencon partopreni en la universitato. Nia kunlaboro estus je tri niveloj: 1. KEL volas esti kapitalpartnero, tio estas parta posedanto de la universitato. La celo de KEL estas subteni kaj protekti Esperanton en la Universitato per sia partopreno kiel kapitalpartnero. 2. Ni intencas helpi por doni al la universitato kompetentajn profesorojn kaj prelegantojn. 3. Ni volas informigi kroatan publikon pri ebleco studi ĉe la Universitato. La universitato jam lanĉis informon pri estonta studado de interlingvistiko. Studante interlingvistikon oni ricevos diplomon kiu ebligos al posedantoj prelegi Esperanton oficiale je diversaj niveloj de oficiala edukado. Kompreneble, por havi rajton instrui Esperanton en Kroatio en ŝtataj lernejoj estos necese adopti diplomon. Ĵus estas serĉataj profesoroj por juro kaj por librotenado. Unu akcio en la universitato valoras 5.000 eŭrojn. KEL fondis fonduson por akiri monon por aĉeti unu akcion. Esperanto-Societo Rijeka jam akceptis decidon partopreni en la fonduso de KEL per 1.000 eŭroj.

Vjekoslav Morankić

# MEZEŬROPO ESTAS MIA HEJMO

Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo Rijeka ĉi-jare okazigis la duan sinsekvan porjunularan renkontiĝon "Mezeŭropo estas mia hejmo". Ok gejunuloj partoprenis la internacian aranĝon en Esperanto-Domo en Kostrena, ĉemara urbeto apud Rijeka, Kroatio. Ili venis el Hungario, Francio kaj Kroatio.

Temo de la aranĝo ĉi-foje estis arkitektura heredaĵo. La temon ili traktis de la 30-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro 2003. Ĉefprelegis pri arkitekturo arkitekto Teodora Kučinac. Gvidanto de la projekto, Spomenka Štimec prelegis pri Tilla Durieux kaj prezentis sian novan libron. Kadre de la temo la partoprenantoj de la renkontiĝo trarigardis kelkajn lokojn, ekzemplojn de arkitekturo de ilia regiono: urbeton Opatija, vilaon Astra en Lovran kaj urbon Rijeka.


La partoprenantoj el ĉiu lando prelegis pri sia nacia lingvo kaj kulturo. Ankaŭ sufiĉis tempo por promenadi, bani en la maro kaj amuzi sin per programeroj kiujn la partoprenantoj mem kreis.

La organizantoj volas okazigi la aranĝon ankau estonte kaj invitas gejunulojn partopreni.

*Emil Hrvatin*



***La partoprenantoj dum trarigardo de urbo Rijeka.***
***Fotis: Boris Di Costanzo***



IZVIĐAČKO ODMARALIŠTE SKOLTA RESTADEJO

# ESPERANTO DOMO

**KOSTRENA – Kroatio, Šodići 3**

Kontakto en Esperanto:
Esperanto Societo Rijeka
Blaža Polića 2
51000 RIJEKA, Kroatio
Tel/fakso: ++385(0) 51 228 148
Naslov na mreži – rete:
esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

Kontakto en aliaj lingvoj:
Savez izviđača Rijeke
Bulevar oslobođenja 2 A
51000 RIJEKA, Hrvatska – Kroatio
tel: ++385(0) 51 371 052
poŝtelefono: ++385(0) 98 426 362
retadreso – e-mail: si-rijeke@ri.tel.hr

Esperanto-Societo Rijeka posedas propran "Esperanto-Domon". Ni ludonis ĝin al Savez izviđača Rijeke (Unuiĝo de Skoltoj de Rijeka) por ke ni povu pli ekonomie kaj finance pli sukcese utiligi ĝin. Tamen nia societo laŭ la kontrakto retenis la rajton uzi la restadejon ankaŭ por Esperanto-aranĝoj. Ĝis nun en Esperanto-Domo okazis unua junulara renkontiĝo konata sub nomo MIRO. Okazis pluraj semajnfinaj prelegoj kiujn organizis "Orbis pictus" de Višnja Branković el Triesto, Italio. Interalie, nian domon vizitis hungara kaj Esperanta verkisto Istvan Nemere, kie li havis seminarion pri sia literatura verkado. De tempo al tempo okazis ankaŭ renkontiĝoj de esperantistoj el Rijeka kaj Triesto. La plej gravaj okazintaĵoj en Esperanto-Domo estis dum du sinsekvaj jaroj (2002 kaj 2003) la Kroataj konkursoj pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj kiu okazadis fine de majo kaj Junularaj renkontiĝoj sub nomo "Mezeŭropo estas mia hejmo" okazintaj fine de aŭgusto kaj komence de septembro. Tiajn aŭ similajn Esperanto-renkotiĝojn ni organizos ankaŭ estonte, sed ilia sukceco dependas de esperantistoj mem, fakte de nombro de aliĝontoj al Esperanto-okazaĵo.

Jen sekvas ĝeneralaj informoj pri Restadejo "Esperanto-Domo"

Skolta restadejo "Esperanto-Domo" troviĝas en urbeto Kostrena. Kostrena estas apudmara urbeto situanta 5 kilometrojn for de la centro de urbo Rijeka. De la Esperanto-Domo post dekminuta promenado oni atingas plaĝon kaj apudmaran kvarkilometran promenejon. Proksime estas tenisejo kaj trimejo. La centron de urbo Rijeka oni atingas per lokaj aŭtobusoj kiuj averaĝe frakventas dum ĉiuj 20-30 minutoj. Fervoja kaj aŭtobusa stacioj estas je distanco de 8 kaj flughaveno je 25 kilomtroj. Proksime estas vendejoj, panejo, vojaĝagentejo, ambulantorio, hotelo kaj diversaj gastejoj. Esperanto-Domo konsistas el unua etaĝo kaj teretaĝo, ĝi povas akcepti 46 personojn en plurlitaj ĉambroj (etaĝlitoj). La teretagho konsistas el: 2 ĉambroj (10 kaj 3 litoj), manĝejo respektive kunvenejo aŭ prelegejo, kuirejo duŝejo kaj necesejo. La unua etagho konsistas el: 5 ĉambroj (2/5/8/8/10 litoj), 3 duŝejoj , 2 necesejoj, granda teraso kaj kuirejo.

## OFERTOJ KAJ PREZOJ

Al turismaj grupoj oni ofertas plenan pensionon, duonpensionon, tranokton kun matenmanĝo aŭ nur tranokton. Eblas lui ankaŭ tutan restadejon potage. Por individuaj vizitoj kun malpli ol 10 personoj oni ofertas nur tranokton sen matenmaĝo. Prezoj estas haveblaj laŭ peto. Por 20 personoj oni donas rabaton akceptante unu gaston senpage.

Esperanto-Domo estas konvena por organizi ekskursojn al tre interesaj lokoj.

**Istrio**
Al Nacia parko Brijuni, monto Učka, Poreč, Rovinj, Pula, Višnjan (observatorio), kaj malgrandaj urboj en centro de Istrio

**Apudmara regiono**
Al urbo Rijeka (arkitekturo, muzeoj, kastelo Trsat k.s.), Crikvenica (marbanejo, akvario), Senj (kastelo), Insulo Krk, monaĥejo sur insuleto Košljun k.t.p.

**Montara regiono (Gorski kotar)**
Al Nacia parko Risnjak (linkejo), monto Snježnik (neĝoza), Lokve (groto Lokvarka, lago kaj park-arbaro), Fužine (lago Bajer, groto Vrelo), Skrad (Zeleni vir /verda elfluo/ kaj Vražji prolaz /diabla trapasejo/).

**Lika**
Al Nacia parko Lagoj de Plitvice.

# POKALO KOSTRENA 2003



La duan Kroatan nacian konkurson pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj partoprenis 24 lernantoj el 7 elementaj lernejoj. Ili venis el Matulji, Slavonski Brod, Zagreb (4 lernejoj) kaj Varaždin. La Konkurso estis en du kategorioj, elementa kaj progresinta. Ĵurianoj de la konkurso: Josipa Katunar, Irena Rodin kaj Gordana Katunar proklamis la sekvontajn rezultojn:

***En elementa kategorio:***

1. Luka Račić el elementa lernejo "Gustav Krklec" Zagreb
2. Barbara Babić el elementa lernejo "August Šenoa" Zagreb
3. Valentina Marinović, Elementa lernejo "Mladost" Zagreb

***En progresinta kategorio:***

1. Tea Šimičić el Elementa Lernejo "Mladost"Zagreb
2. Anđela Kanjuo el Elementa Lernejo Dr "Andrija Mohorovičić" Matulji
3. Zdravka Delić el Elementa lernejo "August Šenoa" Zagreb

**Pokalon "Kostrena 2002" gajnis :**

***En elementa kategorio:***
Elementa lernejo "Gustav Krklec" Zagreb

***En progresinta kategorio:***
Elementa Lernejo "Mladost" Zagreb

La plej sukcesaj lernantoj en siaj kategorioj estas premiitaj per pokaloj kaj per po ekzemplero de porinfana libro " La Karamadaro de Petro Nodeto", donaco de eldonisto Josip Pleadin.

Ses lernejoj oficiale sendis kaj finance subtenis siajn lernantojn.

La Konkurso okazis de la 23-a ĝis la 25-a de majo en marborda urbeto Kostrena apud Rijeka. La aranĝo okazis en junulara ripozejo "Esperanto-Domo", propraĵo de Esperanto- Societo Rijeka.

Post ekzameno kaj sekvontan tagon lernantoj amuziĝis en ludado, promenado apud maro kaj banado. Krom tio ili ekskursis en Gorski Kotar, kie ili vizitis urbetojn Fužine kaj Lokve.

Post tagmanĝo en Fužine la partoprenantoj daŭrigis sian vojon al vilaĝo Slavica kaj tie veturis per ĉevala jungaĵo, propraĵo de Vinko Petrović, kiu afable disponigis sin por kontribui al nia projekto.

En Lokve ilin ĝisatendis groto Lokvarka. Trairante mallarĝajn vojetojn kaj krutajn ŝtuparojn ili descendis 140 metrojn profunden kaj trarigardis 900 metrojn da naturaj artaĵoj.

Post kaverno sekvis io entute diversa. Eta farmbieno Lazac ebligas al vizitantojn samtempe ripozi kaj amuzi sin rajdante sur ĉevaloj, ekkonante aliajn bestojn, ludante en infanludejo aŭ simple rigardante naturon je milda printempa suno.

Dimanĉon post disdonado de premioj resto da tempo pasis ĉefe en banado en maro kaj promenado.

Kadre de la aranĝo, sabaton la 23-an de aprilo okazis prelego pri temo "Esperanto kaj Montessori-pedagogio". Prelegis prof. Judita Rey Hudeček en halo de komunumo Kostrena kiu ankaŭ aranĝis manĝeton por ĉeestantoj.

Komunumo Kostrena ege subtenis la projekton. Krom supre menciita ili disponigis al ni sian aŭtobuson por ekskurso kaj donacis al la partoprenantoj monografion de Komunumo Kostrena. La estrino de departamento pri klerigo kaj kulturo de komunumo Kostrena, Vesna Valenčić, vizitis nin dum la prelego kaj deziris al ni sukceson en la projekto kaj en estonta laboro por internacia lingvo Esperanto.

La organizantoj, Esperanto-Societo Rijeka kaj Kroata Esperanto-Ligo intencas ankaŭ estonte okazigi la konkurson.

*Emil Hrvatin*

# RENKONTO EN GOTENBURGO la 28-an de JULIO 2003

Ĉi-jara UEA-kongreso okazis en Gotenburgo en Svedio. Geesperantistoj el Kroatio vojaĝis kune per aŭtobuso. La vojaĝo estis tre malfacila sed multe bela. Unu malgranda detalo el la kongreso restis en mia memoro.

Matene en la kongresa halo plena de partoprenantoj el diversaj landoj de la tuta mondo, mi ekvidis malgrandan virinon. Ŝi surhavis verdan bluzon kiu etendiĝis ĝis ŝiaj genuoj kaj larĝan helverdan pantalonon. En la mano ŝi tenis konusforman pajloĉapelon.

Mi diris: "Jen Vietnamino! Kiel malgranda ŝi estas!", kaj mi turnis min al ŝi petante: "Mi deziras foti vin, ĉu vi permesas?" La sinjorino tuj metis sian ĉapelon sur la kapon kaj kun milda rideto starigis sin inter nia prezidanto kaj lia edzino. Mi estis kontenta. Sed al mi venis nova penso: kiel danki al la virineto? Inter miaj malluksaj vestoj mi havis novan T- ĉemizon. Sur ghi estas desegnita delfeno kaj surskribo "Kostrena, Esperanto-konkurso". Jen donaco! Mia T- ĉemizo.

Sekvontan tagon en la halo mi ekvidis ŝin. Mi alproksimiĝis al ŝi kaj diris: "Saluton sinjorino. Vi hieraŭ afable permesis al mi foti vin. Mi estas tre dankema al vi kaj deziras doni al vi malgrandan donacon. Mia lando estas Kroatio. Mi vivas en Rijeka, granda haveno sur Adriatika maro. Proksime de Rijeka troviĝas urbeto Kostrena. Tie nia societo havas Esperanto-Domon". Tiel oni sur alia flanko de la mondo aŭdos pri Kroatio kaj Rijeka kaj Kostrena, pensis mi.

Apud ŝi staris majuna sinjorino, ŝia amikino. Ŝi ekrigardis min kaj diris: "Ŝi estas surda!".

Ho, mia Dio - murmuris mi.



***Rijekanoj en la akceptejo de la UK en Gotenburgo. Fotis: Boris Di Costanzo***

## 35-a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Ekde la 17-a ĝis la 23-a de februaro 2003 okazis en urbo Triesto aranĝo kiun tradicie organizis gesamideanoj el TEA - Triesta Esperanta Asocio. Aranĝo nomita "35-a SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO" estis oraganizita dum tuta semajno kaj ĉeestis ĝin la lastan tagon niaj geklubanoj Ana Then, Vjekoslav Morankić, Adela Franelić kaj Boris Di Costanzo. Dum la Semajno oni pritraktis diversajn temojn de scienco ĝis amuzo. Kiel montras la numero en la titolo, la projekto vere laŭdindas pro longjara daŭro. Dankon al la TEA-noj.

Boris Di Costanzo



***Ĉeestantoj de la programo en Triesto dum Semajno de Internacia Amikeco.***

# FESTOJ DE NIA SOCIETO

Trifoje dum pasinta jarperiodo nia membraro ariĝis pro specialaj kialoj. Lundon la 16-an de decembro 2002 ni festis Zamenhofan Tagon. Post jarasembleo kiu okazis la saman tagon kaj kiun partoprenis 17 membroj, la festo komenciĝis per himno kaj parolado de prezidanto de la societo Vjekoslav Morankić. Dum manĝeto ni aŭskultis Esperantan muzikon kaj poste ni spektis vidbendon pri Universala Kongreso en Varsovio je centjariĝo de Esperanto. Fine ni bondeziris al novelektita prezidanto de la societo Boris Di Costanzo kaj al sekretario Vjekoslav Morankić.

La 14-an de aprilo 2003 ni okazigis memortagon de Zamenhof. Dum la vespero disdonitaj estis atestiloj al kursanoj kiuj sukcese ekzameniĝis kaj sinjorino Josipa Katunar legis paroladon de L.L. Zamenhof de la unua Universala Kongreso En Boulogne-sur-Mer, Francio.

La plej granda festo okazis la 11-an de novembro 2003. Preskaŭ trideko da niaj membroj ariĝis por solene malfermi novan ejon de la societo. Dum manĝeto nia prezidanto Boris Di Costanzo bondeziris al membroj kaj al la societo kaj esprimis esperon ke ni ankoraŭ venos tiunombre. La vespero trapasis en bona etoso, muziko kaj babilado.

*Emil Hrvatin*



***Transdono de atestiloj post ekzameno pri A kurso komence de memortagoi al la kreinto de Esperanto.***
***Fotis: Boris Di Costanzo***

# NI PLANTIS OLIVARBOJN

Dufoje ĉi-jare esperantistoj el Rijeka ekskursis en Kaštelir. Organizinto de ambaŭ renkintiĝoj estas Marcello Trampuh, nia elstara membro. Ĉi-artikole mi priskribas la unuan el tiuj ekskursoj.


Dimanĉon la 23-an de marto 2003 18 Rijekaanoj per luita aŭtobuso ekveturis Istrion por renkonti samideanojn el Triesto. La kialo de la renkontiĝo estis plantado de olivarboj. Kvindeko da partoprenantoj ĝuis mildan printempan sunon kaj afablecon de niaj gastigantoj.

En korto de gesinjoroj Trampuh, post kafumado, je nomo de nia societo sinjoro Vjekoslav Morankić plantis olivarbon nomatan "Kroatio". Ankoraŭ oni plantis olivarbojn nomatajn "Germanio", "Italio", "Rumanio", "Rijeka" kaj "Kavasaki". Post trarigardo de Kaštelir kaj tagmaĝo la partoprenantoj ekskursis al Novigrad. Poste restis sufiĉ da tempo por ankoraŭ iom babili kaj amikiĝi kaj, fine, saluti unu la alian.

*Emil Hrvatin*



***Diligentaj samideanoj ĉe plantitaj arboj***
***Fotis: Boris Di Costanzo***



# RENKONTIĜO EN KAŠTELIR

Kiel planite la 25-an de oktobro 2003 esperantistoj de urboj Triesto kaj Rijeka vizitis samideanon Marcello en Kaŝtelir apud Poreč (Parenzo). Celo de la vizito estis gustumi novan vinon kiun produktas Marcello. La tagon antaŭe subite atakis nin malvarma vetero kun pluvo kaj neĝo. Feliĉe, sabaton ekestis suna vetero, kiu ebligis al vizitantoj ne nur gustumi vinon, sed ankaŭ fari interesan ekskurson al Limski kanal (Canale de Lemme) kaj al Dvigrad (Duecastelli).

Reveninte Kaŝteliron sekvis tagmanĝo kaj fotado ĉe arboj plantitaj pasintjare.

Limski kanal – (Lima kanalo) estas natura vidindaĵo kiu troviĝas inter urbetoj Rovinj kaj Vrsar ĉe okcidenta marbordo de Istria duoninsulo. La kanalo estas eksa riverolito per kiu la rivero fluis al la maro. En sia geologia pasinteco tiu rivero trovis novan subteran vojon al la maro en hodiaŭa Pazinska jama (Pazina kavo) en centra Istrio.


La kanalo longas ĉirkaŭ 10 km kaj je enirejo estas proksimume 600 metrojn larĝa. Ĉe ĝia dekstra flanko, apud urbeto Vrsar, troviĝas "Koversada", la plej granda naturista kampadejo en Kroatio. Ĉe Rovinja flanko ankaŭ troviĝas naturista kampadejo "Valalta". Je la fino de la kanalo troviĝas eta haveno kaj du restoracioj ("Viking" kaj "Lim"). L' akvoj estas ĝis 30 metrojn profundaj. Post abundaj pluvoj videblas multaj aktivaj fontoj ĉe bordoj de la kanalo. Ĝiaj bordoj estas ĝis 120 metrojn altaj. Ĉe suda bordo, kiu estas en ombro, kreskas plejparte folifalaj arboj. La norda flanko, kiu estas eksponata al la suno, estas kovrita per plejparte koniferaj arboj.

Jam de la romia tempo, en la kanalo estis bredataj konkoj, kiuj nuntempe fariĝis specialaĵo. Ĉe la fino de la kanalo je ĝia suda flanko troviĝas monteto S-ta Martino sur kiu ankoraŭ estas videblaj restaĵoj de antaŭhistoria kolonio (kastelo). Je la mezo de la monteto vidante la kanalon troviĝas kaverno nomata Kaverno de sankta Romualdo. Laŭ la tradicio tie vivis je la komenco de la 12-a jarcento sankta Romualdo kiu poste fondis monaĥejon kies ruinoj estas hodiaŭ videblaj ĉe vilaĝo Klošatar ĉe la norda flanko de la kanalo. Arkeologoj trovis en la kaverno restaĵojn de la homa restado jam ekde neolitika periodo.

Post la kanalo en vojo kie iam fluis la rivero, hodiaŭ troviĝas la valo (Limska draga) kiu etendiĝas ĝis la nuna urbeto Pazin, kie troviĝas la menciita kavo. Post kelkaj kilometroj de la kanalo, oni venas al du montetoj situantaj en la valo. Sur ambaŭ montetoj en sia longa historio estis kolonioj konataj kiel Moncastello kaj Castel Parentino. Dum tempo ĉiuj loĝantoj translokiĝis al Moncastello kiu fariĝis urbeto nun konata kiel Decastelli (Dvigrad). La urbeto estis ofte atakata de malamikoj, sed ĉiam la vivo kontinuis. Fine, en la jaro 1630, kiam en Istrio furiozis pesto, la urbo restis preskaŭ sen siaj loĝantoj. La malmultaj kiuj travivis tiun tragedion forlasis la urbon.

Hodiaŭ videblas la defendmuroj kaj turoj de la urbo. En ĝia mezo estas ankoraŭ restaĵoj de foje granda preĝejo de sankta Sofio.

*Marcello Trampuh*



*Trarigardo de Dvigrad.* ***Fotis:Gordana Katunar***

# KONGRESO EL DIVERSAJ ANGULOJ

Gotenburgo - la nova urbo en kolekto de kongresaj urboj, nova kongresa centro - ekkonado de novaj homoj, diversaj lokoj en la urbo kiujn oni devas viziti, muzeoj kiujn necesas eniri, sed ankaŭ nova loko kie necesas pasigi sep noktojn

Tiel, post longeta veturado ni atingis nian celon - Gotenburgon. Ni elbusigis unuan parton de nia grupo en studenta domo kaj resto de ni - pli junaj, ekserĉis nian provizoran hejmon. Iomete ni rondiris, iomete ni serĉis, kaj ... fine ni trovis. Ni eniris hostelon - eta akceptejo, maldekstren sekvis longega, tre klaŭstrofobiiga koridoro.

Proksimume meze de la koridoro malgranda komuna kuirejo, tre simpatia kaj praktika. Fridujo sufiĉa por bezonoj de duono da loĝantoj de nia koridoro, mikroonda forno, kuirforno, vazarlavmaŝino, vazlavujo. Kompreneble, sen tablo - anstataŭ ĝi apud muro etendiĝis verŝteko kun barseĝoj. La kuirejon povus uzi ĉirkau dek personoj samtempe.

Fine de la longega koridoro troviĝas ejo por higieno, respektive unu necesejo kun lavujo kaj necesejo kun lavujo kaj duŝo, do, entute du necesujoj, du lavujoj kaj unu duŝo. En ĉambroj ĉe tiu longa kaj mallarĝa koridoro (tie apenaŭ eblas preterpasi alian personon) loĝis kvindeko da personoj.

Kaj finfine nia ĉambro - dulita. Malferminte la pordon mi ne kredas proprajn okulojn. Imagu spacon 1,5 x 2,5 da metroj. Vi miras kion oni povas loki tien, mi ja respondas. Duetaĝa lito (0,80 x 1,80) kun apartenaj noktolampoj, kvar muraj vesthokoj, miniatura tablo kaj du miniaturaj seĝoj. Pri ŝranko ni eĉ ne pensu - kien ja oni metus ĝin? Ankoraŭ imagu niajn du valizojn sur planko. Kompreneble, vestoj estas daŭre en ili ĉar ni ne disponas je alia loko.




*Ekrskurso tra Kopenhago survoje al la UK en Gotenburgo*

Se oni metus ilin sur seĝojn, oni ne povus sidi ĉar se oni sidus sur malsupran liton, kapo frapadus la supran. Preterdire, ankoraŭ unu bagatelo - ekzistas nur unu ŝlosilo de menciita ĉambro, alian perdis iu antaŭa gasto. Pro tio mi devis ĉiam ĉasi mian samĉambraninon por povi eniri la ĉambron. Sed mi ne povas aserti ke la ĉambro estas malluma ĉar en muro vidalvide de la pordo fenestro etendiĝas de muro ĝis muro.

Konsiderante ĉion, kiel organizi sian vivon en tia spaco. Simple, esti tie nur pro elementaj bezonoj. Alivorte: Matene mia kunulino kuiras kafon. Dum ŝi laboras, mi gvatas liberan lokon en la banejo. Bonŝance mi atendas kelkajn minutojn, malbonŝance mi devas atendi pli longe, aŭ ankoraŭ pli longe, foje eĉ ankoraŭ pli pli longe. Mi finis matenan tualeton, depende de bon- aŭ malbonŝanco, dek ĝis kvardekminutan. Kun poteto mi eliras el hostelo por bruligi dumkafan cigaredon (en la hostelo fumado estas malpermesita), kaj dekon da minutoj mi staras apud cindrujo fiksita sur muron apud pordo, kadro de fenestro estas tablo. Mi trinketas, fumas kaj rigardas kiel maloftaj preterpasantoj strange rigardas min. Poste mi enkuras enen ĉar ĵus venis nia aŭtobuso kiu forveturigos nin al iu el ekskursoj, mi sciigas gajan informon, prenas miajn aĵojn por tiu tago kaj adiaŭas la hostelon ĝis vespero.

Vespere mi ripetas ĉion je inversa sinsekvo kaj tiel sep tagojn. Fine de la kongreso mi eksentis faciliĝon ĉar finfine mi povis diri adiaŭ al tiu hundodometo.

*Gordana Katunar*



# KIAL MI ŜATAS ESPERANTON?

Kiam mi estis knabo dekdujara, en urbo Rijeka oni povis aŭdi pri Esperanto kaj senti spiriton de la internacia lingvo. Tre ofte mi aŭdis interparoladon el radioaparato pri diversaj temoj. La sono de la internacia lingvo estis melodiriĉa. Multajn jarojn poste mi decidis komenci lerni tiun lingvon.

Urbo Rijeka havas societon de Esperanto. Antaŭ du jaroj mi telefonis al sinjoro Vjekoslav Morankić kiu donis al mi unuajn afiŝojn pri Esperanto. Li estis kompetenta persono kiu informas kiel funkcias kaj vivas Esperanto. Mi aĉetis de li mian unuan lernolibron de baza kurso laŭ la Zagreba Metodo. En tiu libro malfacilas lecionoj, sed post kvina leciono lernanto povas memstare iomete korespondi en Esperanto. En la societo mi trovis revuojn "Eventoj" kaj "Komencanto", kaj el ili elprenis adresojn de esperantistoj kiuj volus korispondadi. Post du monatoj mi havis kelkajn korespondamikojn en la mondo. Tio estis personoj el Kanado, Honduraso, Ĉehio, Anglio, Hispanio. Ni korespondadis pri kulturo, politiko kaj popoloj kaj kutimoj en aliaj landoj. Iom post iom el korespondado elkreskas granda amikeco. Tiel mi invitis unu hungaran amikon ke li vizitu min en Rijeka. Kvin tagojn li restadis ĉe mi kiel gasto. Mi gvidis lin tra la urbo montrante monumentojn, arkitekturajn vidindaĵojn, kaj, normale, plaĝojn.En mia kuirejo li preparis al ni hungaran manghaĵon kaj mi reciproke preparis kroatan manghaĵon. Mi devas diri, ke similan amikecon ankoraŭ mi ne spertis. Post kelkaj monatoj mi vizitis lin en Budapeŝto kaj kun li mi ekkonis multajn bonajn homojn ĉar Hungaroj, mi rimarkis, ege similas al ni Kroatoj. Kun aliaj korespondamikoj mi spertis similajn agrablaĵojn per leteroj.

Dum tiuj du jaroj multajn amikojn mi akiris kaj ĉiuj estas veraj amikoj, kiuj volas ĉiam helpi. Dum kongresoj mi neniam vidis malbelajn aferojn ĉe esperantistoj. Ili estas por mi la plej bonaj homoj en la mondo. Finfine Esperanto ŝanĝis mian vivon ĉar mi ekkonis kaj akceptis Esperantan kulturon.

*Pero Krstulović*

# VERDA STELO

Mi rakontos al vi ĉi anekdoton. Ĝi estas por iu nerimarkinda, por mi grava kaj amuza, pri, ni diru, ordinaraj homoj ĉi tie apud ni.


Estis sunbriligita tago. Sidante en certa elita kafejo en Rijeka, mi atendis mian koleginon por kune trinki kafon antaŭ aĉetumado en foirplaco. Miajn pensojn pri Slavonio - kara naskiĝlando - interrompis du pensiuloj, pli laŭtaj ol aliaj gastoj. Baldaŭ mi rezonis, ke ili eniris por babili kaj kafumi.Unu nomiĝas Frane kaj alia Mate.

Post kelkaj minutoj ili komencis tre interesan diskuton .

Frane diris: "Vi ja scias, dum mi laboris, mi havis neniom da tempo por vojaĝi, sed ravis min fremdaj landoj, ekzotikaj regionoj kaj popoloj el malproksimaj landoj; kaj nun mi havas kiom ajn mi volas da tempo sed ... ne multon da mono. Eĉ ne scion de fremdaj lingvoj - kien mi povus iri? Nur iomete mi scias la italan, sed temas pri dialekto, malnova fiumana".

Mate: "Vidu, mi ne havas tiom da problemoj. Efektive, mi scias eĉ ne unu "mondan" lingvon, sed tamen mi konas unu - vere mondan - internacian lingvon. Per ĝi mi povus trairi la tutan mondon, nur se mi havus iometon pli da mono".

*Daŭrigo sur paĝo 14*





Demandis Frane nekredante: "Kiel vi imagas trairi la mondon sciante nur unu ne mondan sed tamen mondan lingvon? Al mi vi fabelojn parolas! Homoj multajn jarojn lernas fremdajn lingvojn por ke ili povu vojaĝi aŭ labori eksterlande ... kaj nur en certa lando aŭ regiono. Entute ne tutmonde. Kiu estas tiu lingvo por vojaĝi tra la tuta terglobo, interesas min?"

Lerte respondis Mate: "Temas pri internacia lingvo nomata Esperanto. Sciante ĝin oni povas travojaĝi la tutan mondon, ankaŭ Ĉinion."

Rebatis Frane: "Dankon pro bona ideo. Mi iros al kurso de Esperanto kaj mi esperas post ses-sep jaroj ellerni tiun vian Esperanton. Eble mi vivos sufiĉe longe."

Mate: "Atendu, tie kuŝas problemo. Vi bezonas nek sep nek ses jarojn. Ankaŭ ne kvin. Sufiĉus al vi unu, eble du jaroj da lernado por ellerni ĝin kaj kontakti kun esperantisoj en la tuta mondo. Via klopodo elpagus sin multoble. La kurso ne estas multekosta, la lingvo estas tre facila, vi povus baldaŭ ellerni ĝin. Pro relative rapida sukceso vi estus kontenta kaj feliĉa. Eniru Esperantan societon, aliĝu kurson kaj vi plenumos viajn dezirojn. Vi vojaĝos!"

Atendu: kie ajn vi vidos verdan standardon kun **verda stelo**, sciu - tiu estas gvidstelo en socion pacisman, neŭtralan, kiu ligas homojn el ĉiuj landoj. Ĝi estas socio de amikeco sen limoj. Ĉu tio, ja, ne belegas?

Post iom da tempo la du pensiuloj eliris. Miaj pensoj vagis laŭ vojoj de la vivo kiuj gvidis min kaj forkondukis malproksimen de mia naskoloko, kaj ĉe mia forpasinta patro kiu sciis kelkajn mondajn lingvojn kaj Esperanton ellernis aŭtodidakte. Li lernis kun siaj kuzoj, parolis kun ili kaj entuziasmiĝis je ideo pri la **monda lingvo - Esperanto** kiun realigis Polo Lazar Ludvig Zamenhof, kiun li admiris pro lia genieco.

Pensoj estas la plej granda produkto de homa cerbo, mirindaj kaj misteraj, la plej rapidaj en la mondo, ili vagas kaj vojaĝas, turnas kalejdoskopon de la vivo - vagas, vagas, kaj tiam haltas, ĉi tie, malproksime, fore de patrujo, de Slavonio, kie mi pasigis infanecon kaj junecon kaj kondukas min ĉi tien en realecon, ĉi tien kie mi nun vivas, kie mi renkontis same bonajn kaj mirindajn homojn.


Impresis min konversacio de du nekonataj pensiuloj kaj denove miaj nehaltigeblaj pensoj vagas for de realeco, de iuj flankoj nekomprenebla. Se mi estus tiel influhava, mi proponus leĝon pri edukado de internacia lingvo de unua klaso ĝis fakultato, la lingvon kiu utilus al venontaj generacioj. Daŭre, mi enkondukus Esperanton en fakultaton por pli aĝaj personoj, senpage, lernu ĝin tiuj kiuj volas, dezirantaj je scio, tiuj kiuj kreis tion, kion ni nun havas. Tiam mi retiriĝis kaj koleris je miaj pensoj. Mi diris al mi mem: stultaj pensoj, neeblaj ideoj, for de mi, tio ankoraŭ ne eblas. Sed iun tagon tio efektiviĝos kaj ekestos realeco, tiel ordinara kaj klara. Denove ekprenis min ĝojo pro vivo. Reaperis miaj pensoj pri ĉio. Pri vivo, pri sukcesoj kaj fiaskoj, pri beleco, malgajeco, pri ĝojo, pri ĉio, pri tio ke mi tre kontentas ĉar mi estas en tiu granda familio esperantista, kie mi estas kore akceptita kaj kie mi agrable fartas. Mi ligis agrablan kun utila.

Interrompis min voĉo de mia kolegino. Kun ŝi mi daŭrigis la konversacion pristudante ŝtonetojn el mozaiko de frua infanaĝo ĝis nun, konkludante: Belas la vivo.

Skribita la 19an de novembro 2003

*Ana Then*





# MEMORPAĜO

***JE MEMORO AL NIAJ GESAMIDEANOJ FORPASINTAJ INTER LA LASTA KAJ LA NUNA NUMERO DE GAZETO "HELIKO"***

***GLORON AL ILI!***

| Forpasinta membro | jaro de forpaso |
|---|---|
| Emerik Pretnar | 1992 |
| Slobodan Vitolović | 1993 |
| Mehmed Jakupović | 1997 |
| Mirjana Vukelić | 1997 |
| Igor Mandić | 1997 |
| Albert Desardo | 1998 |
| Ante Rusković | 1999 |
| Nadia Blašković Morankić | 1999 |
| Barica Grgurević | 2000 |
| Radoslav Škalamera | 2001 |
| Gita Mandić | 2002 |
| Rudolf Medved | 2002 |
| Đorđo Guzović | 2002 |
| Anka Frančić | 2003 |
| Paolo Ficiur | 2003 |
| Vlasta Pretnar | 2003 |
| Katarina Diminić | jaro nekonata |
| Ivan Širola | jaro nekonata |
| Ksenija Marinković | jaro nekonata |
| Nedjeljko Raos | jaro nekonata |
| Josip Širola | jaro nekonata |
| Cvijo Marinković | jaro nekonata |
| Katarina Jelić | jaro nekonata |



*Solena malfermo de nova ejo de Esperanto-Societo Rijeka*

# INFORMO PRI ESTONTAJ AKTIVECOJ

**Zamenhofa Tago en Rijeka 2003**

Zamenhofa tago ĉi jare okazos en Rijeka en nova societejo, Blaža Polića 2 (Tržnica Brajda) lundon la 15-an de decembro je la 19h00.

Nepre ĉeestu ankaŭ tiuj kiuj ankoraŭ ne vidis nian novan pli grandan societejon.

**Programo por januaro 2004**

Societejo estas malfermita ĉiun lundon kaj ĉiun vendredon de 18h00 ĝis 20h00.
Regulaj kunvenoj kun prelegoj okazas ĉiun lundon en la societejo je la 19h00.

| | |
|---|---|
| la 5-an | Amikeca Kunveno |
| la 12-an | Projekto "Esperanto en Eŭropia Unio"<br>Prelegos: Vjekoslav Morankić |
| la 19-an | Informo pri Semajno de Internacia Amikeco en Triesto<br>Informos: Boris Di Costanzo |
| la 26-an | Miaj spertoj en internacia korespondado<br>Prelegos: Pero Krstulović |